

n-roj 10-13, Januaro-December 2016

# ESPERANTO\*INFO

\*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

## ESPERANTO\* CAT

\*Associació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785.

Membro de FOCIR  
(Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2017:  
individua abonanta membro, 64 eŭroj;  
pensiuloj: 50 eŭroj;  
subtenanta membro, 128 eŭroj;  
juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,  
Agència 001, Barcelona  
Kontonumero:  
3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
UEA-konto: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:

Prezidanto: Josep Franquesa;  
vicprezidanto: Carles Vela;  
sekretario: Alfons Tur;  
kasisto: Sebastià Ribes;  
voĉdonantoj: Gemma Armadans,  
Llibert Puig, Miquel Gómez,  
Montserrat Franquesa, Ramon Perera  
kaj Xavier Alcalde.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental),  
Països Catalans/Kataluna Landaro  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: info@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

## RAPORTO PRI LA 101-A UNIVERSALA KONGRESO EN NITRA, SLOVAKIO



### Partopreno de katalunaj esperantistoj

Post la jubilea pasintjara Universala Kongreso en Lille, ĉi-jare la slovak teamo, kiu de 2008 respondecas pri la Somera Esperanto-Studado, organizis la 101-an Universalan Kongreson en la slovak urbo Nitra. Partoprenis 1250 esperantistoj el 60 landoj, inter ili 13 katalunoj (8 el ili KEJ aŭ KEA-anoj). Tre impresis nin la engaĝiĝo de la urbo Nitra en la kongreso: ĉie en la urbo vidiĝis esperantaj flagoj kaj afiŝoj pri la kongreso. Aldone en superbazaro, en la sinagogo kaj en la ĉefa urba teatro troviĝis detalaj ekspozicioj pri esperantaj aferoj kaj la

urbestro mem partoprenis la ĉefajn solenaĵojn de la aranĝo kaj organizis (kaj pagis!) la malfermajn kaj fermajn koncertojn okazintaj en la ĉefa placo alireblaj al ĉiuj urbanoj kaj kongresanoj.

### Movada Foiro

Pro la favora vetero la Movada Foiro okazis ekstere antaŭ la kongresejo. Nia prezidanto Josep Franquesa profesie reprezentis nin kaj renkontis malnovajn amikojn el pluraj kontinentoj. La vizitintoj demandis al ni pri la novaj eldonaĵoj de KEA kaj furoris la malmultaj ekzempleroj, kiujn ni kunportis por vendi.

**Internacia Kongresa Universitato**

Kadre de la kongreso okazis la 69-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. Inter la tre altnivelaj kursoj pri pluraj temoj rimarkindas *Naŭ demandoj pri lingva justeco en la fakliteraturo* de nia samasociano Xavi Alcalde (vi povas legi rilatan artikolon lian pri la sama temo en la lasta numero de Kataluna Esperantisto), kiu fariĝis ankaŭ parto de kurso kadre de la Akademio Internacia de la Scienco. Aliaj du AIS-kursoj estis tiu de Bengt-Arne Wickström pri lingvaj rajtoj kaj tiu de Amri Wandel pri astrobiologio. Aldone, menciindas la interese ga prelego *Socia justeco kaj publika sano kiel principoj fronte al la neatendita kontraŭstara sinteno al vakcinoj* majstre eldirita de José Antonio Vergara, la interesplena *Edukado al repaciĝo: Kanadaj lernejoj alfronte al la indiĝena realo* de Mark Fettes kaj la altscienca *Novaj teknikaj evoluoj por bildigi procezojn je atoma kaj subatoma nivelo* de Orlando Raola, kiu tre bone sukcesis komprenigi eĉ al la nefakuloj la bazajn aferojn de sia fako.

**Kongresa Temo**

La ĉi-jara Kongresa Temo estis Socia justeco – lingva justeco. “Diversaj kompreno de la daŭra aspirado al paco kaj frateco inter la homoj ofte montriĝis kiel unu el la ĉefaj motivoj subteni Esperanton [...] Ne malofte, la aktivuloj por Esperanto emas engaĝi sin en luktoj kontraŭ diversaj formoj de lingva maljusteco, kiuj foje estas flanko de pluraspekta, pli larĝa fenomeno, en mondo kie pligrandiĝas seriozaj formoj de malegaleco ene de kaj inter pluraj landoj kaj regionoj.” (el la programlibro de la kongreso). Reĝisoris Giridhar Rao, Manuela Ronco kaj José A. Vergara, kiuj moderigis debatojn kaj prezentis la prelegantojn, inter kiuj estis Xavi Alcalde, enkondukinte la unuan sesion per prelego pri la rilato inter lingva justeco kaj lingvaj konfliktoj. La Kongresa Temo estis ankaŭ unu de la argumentoj de la movadaj podkasto kiuj okazis tage en tujaj elsendoj, kun rekta

partopreno de la ĉeestantoj kaj de la aŭskultantoj rete. Interalie, rimarkindas ankaŭ tiuj pri Esperanto-instruado, faka agado pere de Esperanto, Esperanta kulturo, parolado pri UEA kaj venonta UK en Seulo.

**Esperantologia Konferenco**

La 39-a Esperantologia Konferenco titoliĝis *Evoluo kaj evoluigo de la internacia lingvo Esperanto: diversspecaj influoj kaj faktoroj*. Dum tri horoj la prelegantoj, tre bone reĝisoritaj de Orlando Raola, prezentis siajn kontribuojn al sufiĉe granda ĉeestantaro en ege varma salono. Menciindas la prelego de Christer Kiselman pri la rilato de Zamenhof kun la jida lingvo kaj tiu de Federico Gobbo pri la zamenhofa uzo de la esprimo “lingvo internacia” anstataŭ “internacia lingvo”.

**Aliaj prelegoj**

Inter la prelegoj kiuj ne apartenis al IKU/AIS, EK kaj Kongresa Temo, elstaris *Kiel efike lerni fremdajn lingvojn* de la slovaka interpretistino Lydia Machová, kiu tre klare klarigis al la multnombra ĉeestantaro sian metodon por lerni ĉiun duan jaron novan lingvon. La prelego estis tiel sukcesa, ke ĝi ripetiĝis en alia pli granda salono la sekvan tagon. Laŭ tiu juna poligloto sukcesa lernado de fremda lingvo baziĝas sur kvar punktoj: amuziĝo (ĉiam serĉi interesajn temojn), kvanto (multe legi, multe aŭskulti, multe paroli), frekvenco (regula kontakto kun la cellingvo) kaj sistemeco (regula memkontrolado de la ekzerctipoj). Aliflanke, niaj samasocianoj Michael Boris Mandirola kaj Enric Baltasar sukcese gvidis du atelierojn dum la Kleriga Lundo celante la trejnadon de aktivuloj pri strategia planado.

**Aliaj eventoj**

Kadre de la UK, okazis ankaŭ interesaj eventoj ekster la UK. Interalie, rimarkindas la altnivela internacia konferenco pri lingvopolitiko “Lingva komunikado en la Eŭropa Unio”. Krom spertuloj, partoprenis altranĝaj politikistoj, inkluzive de la eŭropa

komisionano pri sano, la litva Vytenis Andriukaitis, kiu prelegis Esperante. Fakte, la zamenhofa lingvo estis unu el la laborlingvoj de la konferenco, kune kun la slovaka kaj la angla.

**KER-ekzamenoj**

Kiel kutime, kadre de la kongreso, oni okazigas KER-ekzamenojn. Partoprenis entute 18 personoj el 13 landoj. Kvar katalunoj ekzameniĝis (Saioa, Nicolau, Krishna kaj Toni). Nia samasociano Viktoro Solé, kiu estis helpanto, ricevis de Katalin Kováts la atestilojn de la ekzameniĝintoj de la pasintjuna sesio en Sabadell.

**Koncertoj**

La muziko, kiel ĉiam, estis grava ingredienco de la kongreso. Elstaris la germana blinda muzikisto Kaŝi (kiu unuafoje koncertis en Universala Kongreso, atinginte grandan sukceson) kaj Sepa kaj Asorti, litova familia muzikgrupo, kiu dancigis multajn kongresanojn kaj urbanojn. En pli malgrandaj ejoj kantis ankaŭ Georgo Handzlik kaj Mikaelo Bronŝtein, kaj debutis la junaj katalunoj Noa Aymamí kaj Martí Solé.

**Teatro**

Tre surprizis nin, ke la ĉefa kongresa teatraĵo estis *La kredito*, majstra verko de la kataluna aŭtoro Jordi Galceran (*El crèdit*, 2013) esperantigita de Georgo Handzlik, kiu aktoritis kune kun Saŝa Pilipovic. Temas pri verko jam surscenigita en aliaj landoj, inkluzive de la pasinta hispana kongreso en Herrera del Duque. La rezulto estis tiel profesia kaj altnivela, kiel ĉiu bonega nacilingva teatraĵo. Oni devas ankaŭ danki al Jordi Galceran pro la fakto, ke li permesis tiujn esperantajn prezentaĵojn tute senpage.

**Solena Fermo**

En la Solena Fermo oni anoncis la nomojn de 14 esperantistoj, kiujn la Estraro de UEA honorigis per Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo

pri Elstara Arta Agado. Inter aliaj, menciindas Ĵomart Amzejev kaj Natalja (Nataŝa) Gerlach (Svedio) pro longtempa kontribuado al la Esperanto-muziko, Jean Codjo kaj Adjévi Adjé (Kanado, Togolando) pro longdaŭra agado por Afrika Esperanto-Movado kaj Ruth Keveš-Cohen (Usono) pro granda kontribuado al la kreo kaj subtenado de la E-kurso por anglalingvanoj ĉe Duolingvo. Fine, estis oficiale anoncote, ke la UK-2018 okazos en Lisbono.

**Junulara Programo**

Estas konate, ke la slovaka esperantistaro estas ĉefe juna kaj agema kaj ili bone profitis la okazon por starigi viglan junularan programon, kiu inkluzivis internacian manĝvesperon (la partoprenintoj kunportis tipajn sialandajn frandaĵojn), noktan diskejon, ĉarman gufujon kaj gravan futboldatĉon inter loka klubo kaj kuraĝa esperantista teamo preskaŭ venkinta. Inter la plej seriozaj programeroj nia samasociano Enric Baltasar gvidis *Movadajn studkazon* kaj *Rolludon pri konvinkado*.

**KEA-partopreno en UK dank’ al FOCIR**

De tempo al tempo utilas memori konitaĵoj eble ne tiom konitaj. KEA membras en Federacio de Internacie Agnoskitaj Organizaĵoj Katalunaj (FOCIR, laŭ la kataluna nomo) kaj dank’ al tio, ni ĉiujare petas kaj ricevas monhelpon por sendi KEA-representantojn al la UK. Dum multaj jaroj, tiu mona helpo multe subtenis nian asocion. En 2016 ni ankaŭ petis kaj ricevis tiun subvencion, kiu permesis ke Josep Franquesa, Xavi Alcalde kaj Viktoro Solé reprezentu nin en Nitra.

.....  
Viktoro Solé  
kaj Ksavero Urbestro



*Espai Vilaweb en Barcelono akceptis la prezenton de la numero 294 de la Revista de Girona.*

**KUNLABORADO DE KEA KAJ LA CONSORCI PER A LA NORMALITZACIÓ LINGÜÍSTICA**

La 11-an de januaro 2016a Kataluna Esperanto-Asocio kaj la loka delegacio de la urba distrikto Sants-Montjuïc de la Consorci per a la Normalització Lingüística (CPNL) kunorganizis prelegon pri la internacia lingvo al la lernantoj de la kurso “Lingvo kaj kulturo”, kiu okazas en la sidejo de tiu delegacio.

En tiu prezento la instruistoj Ramon Perera kaj Montserrat Franquesa prelegis pri la deveno, evoluo kaj ĉefaj ecoj de Esperanto. La lernantoj sekvis la klarigojn kun intereso kaj petis aldonajn informojn.

Oni antaŭvidas pluan estontan kunlaboron inter KEA kaj CPNL.

**LA NUMERO 294 DE LA REVISTA DE GIRONA DEDIĈIS DOSIERON AL ESPERANTO EN LA ĜIRONA REGIONO**

La unua numero de la jaro de la *Revista de Girona* dediĉis 22-paĝan dosieron al Esperanto, kunordigata de Dolors Grau, arkivistino, kaj Maria Dolors Godoy, Esperanto-instruist-

ino kaj KEA-ano. Ĝiaj ĉefaj artikoloj estas “L’esperanto a les comarques gironines. A un clic de distància”, “Un corrent persistent”, “El fons esperantista de l’Arxiu Municipal de Cassà de la Selva”, “Els principals promotors del moviment”, “La nova Ĝirona Espero”, “Sociologia del primer esperantisme gironí” kaj “Una mirada al futur”, krom informoj pri la Esperanto-grupo Brava Marbordo de Roses kaj pri niaj samasocianoj Lluís Batlle, Pedro M. Martín Burutxaga kaj Josep Virgili. La artikolojn verkis, krom la kunordigantoj, la loka historiistino Xènia Berta.

**PREZENTO EN BARCELONO DE LA REVISTA DE GIRONA**

La pasintan 28an de januaro Espai Vilaweb en Barcelono akceptis la prezenton de la numero 294 de la *Revista de Girona*. Ĉar nia asocio engaĝiĝis en la redaktado de ĝia dosiero, eksterordinare la revuo estis prezentita for de la Ĝirona regiono kaj la revua redakcio “moviĝis” al Barcelono.

Antaŭ trideko da esperantistoj kaj simpatiantoj, la vicprezidanto de la Deputitaro de Ĝirono kaj raportanto de la Kultura Areo, Albert Piñeira, la prezidanto de KEA, Josep Franquesa, la redaktiestro de *Revista de Girona*, Xavier Cortadellas, kaj la kunord-



igantoj de la dosiero, Dolors Grau kaj Maria Dolors Godoy, prezentis ĝin.

**LA FUTURO DE LA LINGVO  
ESPERANTO EN ARTIKOLO  
ĈE NÚVOL FARE  
DE GRISELDA OLIVER**

Okaze de la prezento en Barcelono de la numero de *Revista de Girona* dediĉita al la esperantista movado en Ĝirona regiono, la 24an de januaro Griselda Oliver rezumis sian enhavon en artikolo ĉe la reta revuo *Núvol.com* titolita *El futur de l'esperanto*.

**KEA DAŬRIGAS  
KUNLABORADON KUN  
LA STUDCENTRO JOAN  
BARDINA. NOVAJ ARTIKOLOJ  
TRADUKITAJ**

Kataluna Esperanto-Asocio daŭrigas la tradukadon en Esperanto de artikoloj publikigitaj de la Studcentro Joan Bardina.

La Studcentro Joan Bardina estas neprofitcela asocio cele al socia evoluigo, surbaze de la sugestoj de Joan Bardina, de studoj kaj proponoj, kiuj helpu en la priskribo de modelo de homaj solidareco kaj kunvivado. La nomo de la Centro ŝuldiĝas al la pedagogo kaj instruisto de instruistoj Joan Badina i Castarà (Sant Boi de Llobregat 1877-Valparaiso 1950), kiu krom revoluciiganto de la kataluna pedagogio en la komenco de la 20-a jarcento, estis kreinto kaj instiginto de novaj sociaj, ekonomiaj kaj politikaj vojoj.

La lastaj artikoloj tradukitaj Esperante estas la jenaj :

- *Un estat, dues llengües vernacles / Unu ŝtato, du propraj lingvoj*
- *Reflexions de l'Agustí Chalaux fetes l'any 1979 / Pripensoj de Agustí Chalaux faritaj en 1979*

**UMBERTO ECO  
KAJ ESPERANTO EN ARTIKOLO  
ĈE NÚVOL.COM  
DE MONTSERRAT FRANQUESA**

Nia samasocio Montserrat Franquesa, okaze de la morto de la semiologo kaj verkisto Umberto Eco, pripensis la italan saĝulon, la gepatran lingvon kaj nian interlingvon en *“Umberto Eco, la llengua materna i l'esperanto”*, aperinta en la revuo *Núvol.com* la 20an de februaro.

**PREZENTO EN CASSÀ  
DE LA SELVA DE LA  
REVISTA DE GIRONA**

Post sukcesa prezento en Barcelono, la numero estis nove prezentita en Cassà de la Selva la 5an de marto, en Can Trinxeria. Nome de KEA partoprenis tiun evento estrarano Xavier Alcalde.

**TUTMONDAJ POEZIOJ  
EN ĜIRONO**

La 17-an de marto okazis en Ĝirono la recitalo *“Tutmondaj poezioj”*, organizita de la Amikoj de Unesko, Instituto pri Kataluna Beletro kaj la Volontularo por la (kataluna) lingvo. En tiu evento oni prezentis la poemon, kiu specife por tiu okazo verkis la poetino Olga Xirinacs. Oni legis la poemon tradukitan al 15 lingvoj kaj la recitalo estis dividita en tri blokoj. En la lingvo, kiu *prezidis* ĉiun blokon oni legis la tutan poemon kaj en la ceteraj kvar lingvoj oni legis kvaronon. En la unua bloko la *prezida* lingvo estis la

kataluna, en la dua la hispana kaj en la tria Esperanto. En la internacia lingvo legis la poemon nia amikino Maria Dolors Godoy.

**PREZENTO EN BARCELONO  
DE LA ESPERANTA MOVADO**

La 18-an de majo niaj samasocioj Ferriol Macip kaj Roger Santjaume prezentis la Esperantan movadon kadre de interesplena renkontiĝo de universitataj studentoj.

**KULTURAJ EKSKURSOJ  
EN CORNELLÀ DE LLOBREGAT**

La 29-an de majo, niaj samasocioj Antonĉjo kaj Maria organizis kulturajn ekskursojn en Cornellà de Llobregat. La celo estis pli bone diskonigi parton de regiono foje forgesita, montrante en la internacia lingvo juvelojn kaj historion de miljara vilaĝo en la periferio de Barcelono. La 10 partoprenintoj sekvis kun intereso la klarigojn de la gvidistoj kaj esprimis deziron lerni pli pri vilaĝo, kie kaŝas multaj nekonataj trezoroj al eksteruloj. Ili restis surprizitaj pro la kvanto da historio kaj vivo kaŝitaj en pluraj anguloj de Cornellà, ekzemple la industriaj kolonioj de la unuaj jaroj de la 20-a jarcento, la modernismaj domo, aliaj anguloj ligitaj al la plej aktuala historio ankoraŭ travivata aŭ al la esperantisma historio, nekomuna kastelo, tombejo for la malnova urbo aŭ gvaturo kun vidaĵoj enviindaj. Ĉar pliaj personoj interesiĝis, la vizito ripetiĝis la 26-an de junio.

**ORDINARA ASEMBLEO DE KEA**

Sabate la 12-an de marto, je la 17 horo, okazis ordinara asembleo de Kataluna Esperanto-Asocio en la trinkejo del CAT, ĉe Travessia de Sant Antoni, 6, en Barcelono, kun partopreno de ĉirkaŭ 20 asocioj. Krom la kutimaj aferoj –pasintjara agadraporto, agadplano por la nova jaro, buĝeto pasintjara kaj ĉijara–, estraraniĝis Antoni Gimeno kaj Miquel Gómez, kiuj ricevis publikan aplaŭdon.

**BUDO KAJ FULMOKURSOJ  
EN BARCELONO**

Krom la tradicia budo en Rambles kaj la tieaj fulmokursoj de nia kara instruisto Viktoro, KEA festis la Tagon de Sankta Georgo per nova eldono: *Guia de conversa català-esperanto. Breu introducció a la llengua i el moviment esperantistes*, verkita de Pedro M. Martín Burrutxaga. La aŭtoro, esperantisto ekde multaj jaroj kaj samasocio, partoprenis multajn internaciajn kaj naciajn kongresojn kaj renkontiĝojn.



**KEA EN FESTIVALO  
EN VEU ALTA 2016**

Kadre de libera laŭtvoĉa legado dum la festivalo *L'EVA 354 i el fòrum obert. Tu mateix! [EVA 354 kaj la malferma forumo. Vi mem!]*, nia prezidanto Josep Franquesa legis parton de *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* en Sant Sadurn d'Anoia la 11-an de junio.

**LA ZAGREBA METODO, RETE  
KAJ SENPAGE, ANKAŬ EN LA  
KATALUNA**

Julie aperis la reta versio de la fama metodo por lerni Esperanton kreita de Zlatko Tišljär. La kataluna tradukisto de la Zagreba Metodo estis la konata aktivulo Karles Berga. Poste, Rubeno Fernández aldonis plurajn klarigojn kaj plibonigis la tutan kurson.

**SABADELL GASTIGIS LA 5-AN  
TUTMONDAN EKZAMENTAGON**

La 4-an de junio 2016 okazis la 5-a Tutmonda Ekzamentago en 15 urboj de 12 landoj. Partoprenis ĝin 123 homoj. Unu el tiuj urboj estis Sabadell, kie troviĝas la sidejo de Kataluna Esperanto-Asocio (KEA). Tie ekzameniĝis 8 homoj, 5 laŭ la B1-nivelo kaj 3 laŭ la C1-nivelo de la Eŭropa lingva regularo nomita KER. Maria, kiu ekzameniĝis en la B1-nivelo, deklaris: *“la ekzameno estis pli amuza kaj facila ol mi antaŭvidis”*.

Katalin Kováts, la ĉefa organizanto de la Tutmonda Ekzamentago, kiu majstre organizis la aranĝon, gratulis la lokan gvidanton, Viktoro Solé, kaj la lokan helpanton, Rubeno Fernández, pro la efika kunlaborado.

.....  
Serĝo, Maria kaj Caterina  
(el la grupo de komencantoj de Barcelono)

**DIVERSECO: POEMOJ,  
FABELOJ KAJ KANZONOJ**

Kadre de la serio *Capvespres als Jardinetes [Krepuskoj en la Gardenetoj]*, programita de la Biblioteko Pompeu Fabra el Mataró ekde julio ĝis septembro, estis organizita poezia deklamado la 14-an de julio en kiu rolis Esperanto.

Surprizitaj pro la partoprena sukceso pastinjure, ripetiĝis tiu somera multlingva poezia recitalo en Mataró. Ĝuante la friskon krepuskan kaj kun pokalo de ĉampano ĉe-mane, legantoj de malsamaj lokoj legis en sia lingvo poemojn kaj mallongajn tekstojn amazihe, arabe, angle, germane, kastilie, dane, Esperante, galege, sign-lingve, okcitane, keĉue, paŝtune, perse, pole, svede kaj ĉine.

Nia samasocio Xavier Rodon gvidis la recitalon kaj oni ankaŭ ĝuis la vivan muzikon de Kaj Tiel Plu kaj aliaj invititaj kantistoj.

**KUNLABORO KUN ASSOCIACIÓ  
EL PETIT PRÍNCEP DE  
CATALUNYA**

Kadre de la aranĝo *Associa't a la Festa de la Mercè 2016* [Aliĝu al la Mercè-festo 2016], la 24an de septembro Jordi Calaf i Franquesa partoprenis en multlingva laŭlegado de *La eta princo* en Placo Catalunya, en Barcelono, organizita de la kataluna asocio dediĉita al diskonigo de la fama verko de Antoine de Saint-Exupéry.

**ENRIC BALTASAR ELEKTITA  
NOVA TEJO-ESTRARANO**

La 11-an de aŭgusto 2016 demisiis Ariadna García Gutiérrez pri sia posteno kiel estrarano de TEJO. Unu monato poste, la elekto de Enric Baltasar kompletigis denove la estraron. Laŭ informoj de la TEJO-hejmpaĝo partoprenis la voĉdonon 18 homoj (el



32), 16 favore, neni kontraŭe kaj du sindetenis. Ĝis nun Enric estis komitatano B kaj respondeculo pri nacia agado en Eŭropo.

Ni elstarigas, ke alia membro de Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) estas la nuntempa prezidanto de la organizo, nome Michael Boris Mandirola. Male al UEA, TEJO agnoskas KEJ kiel nacia asocio samnivele al la franca aŭ la hispana, ekzemple.

### EN FOIRO DE SOLIDARA EKONOMIO

KEA partoprenis en la kvina sesio de la Fira d'Economia Solidària de Catalunya (FESC 2016) [Foiro de Solidara Ekonomio de Katalunujo]

Dum la semajnfino de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro por la unua fojo KEA partoprenis la Foiron de Solidara Ekonomio de Katalunujo. Kadre de tiu foiro okazas amaso da prelegoj, atelieroj, kaj spektakloj diversspecaj kaj divesfakaj.

Lastmomente nia asocio sukcesis aliĝi al tiu evento, kiu okazas jam de antaŭ 5 jaroj en la ejo Fabra i Coats, organizita de Xarxa d'economia solidària (XES) [Reto de solidara ekonomio]. Spite al la malbona vetero, kiu devigis la organizon ŝanĝi la situon de diversaj budoj, inter kiuj la nia, ni akiris bonan lokon apud la enirejo kaj tie ni disdonis flugfoliojn, informis la homojn pri Esperanto kaj eĉ vendis kelkajn librojn.



En Foiro de Solidara Ekonomio

Ni esperas ke en estontaj sesioj ni povos pli frue aliĝi kaj proponi debatojn aŭ prelegojn pri lingva justeco internacie kaj pri la rolo de Esperanto inter la plej adekvataj solvoj al tiu problemaro.

### KOMPLETE ENKATALUNIGITA LA KURSO DE ESPERANTO DE LERNU.NET

Pasintoktobre oni kompletigis 100%-e la katalunlingvan version de la retejo lernu.net, kiu prezentas senpagan retan kurson de Esperanto. Ĝi aparte indas por komencantoj kaj memlernantoj.

La kurso baziĝas sur la legado de mallongaj ĉapitroj de ege amuza kaj distra historio pere de kiu oni profundigas en diversaj aspektoj de la lernado. La teksto komencas en tre baza nivelo kiu progresadas de ĉapitro al ĉapitro. La paĝo disponeblas en la kataluna, en Esperanto kaj en amaso da aliaj lingvoj.

Avantaĝo de tiu perkomputila kurso estas, ke oni ne bezonas eĉ vortaron, ĉar je muskliko sur iu frazo aperas ĝia traduko. Same, se oni klikas sur iu ajn vorto, la programo redonas la specifan tradukon de la celita vorto. La gramatikaj klarigoj ankaŭ estas tute tradukitaj katalunen.

Resume, fantasta ilo por lerni Esperanton, kiu endas promocii kaj diskonigi en la tuta katalunlingvio.

.....  
Jordi Perera

### ATELIERO DE ESPERANTO EN BENICÀSSIM

Nia samasocio el Benicàssim, Joan Català, organizis atelieron de Esperanto en Benicàssim la 10-an de decembro.

### ENPANTEONIĜO DE LLIBERT PUIG, UNUA KATALUNO APERINTA EN TIU KOLEKTO DE GRAVULOJ

Edukado.net premie publikigas 10-15 novajn prezentojn de vivantaj instruistoj ĉiujare la 15an de decembro. Inter la ĉi-jaraj elektitaj elstaras ke ano Llibert Puig, motoro de la kataluna movado dum diversaj jardekoj. Ĉi tie alireblas lia profilo en la prestiĝa Panteono prizorgita de Katalin Kovats, kie aperas la plej gravaj instruistoj de Esperanto. Llibert estas la unua kataluno en tiu kolekto de gravuloj. Varme kaj solene gratulas nian samasocion la estraro de KEA.

### 12-A INTERNACIISMA RENKONTIĜO EN FIGUERES



Riĉa kaj bunta programo okazis dum la oktobrofina Internaciisma Renkontiĝo en Figueres. Inter la ĉefaj prelegantoj elstaris Manuela Burghelea, kiu parolis pri volontulad-ebloj por junuloj, kaj Mateu Vic, kiu klarigis kiel agi porpace kontraŭ apartismo kaj rasismo en Palestino. Lluís Batlle prelegis pri la (internacia) lingvo de la tuta Hispana Krono dum la 16a jarcento, kaj la ĉarmaj blindulinoj Teresa Marbà kaj Paquita Garcia ofertis lertajn klarigojn sur la mallumo.

Aldone, la renkontiĝo enhavis lingvan angulon, inkluzive de Esperanto-kurso por komencantoj de Pedro M. Burutxaga (kiu ankaŭ prezentis sian konvergvidilon katalunan-Esperantan) kaj de ateliero pri vortkreado de Christophe Chazarein.

Pri la arta dimensio, citindas la prelego de Floréal Martorell pri la historio de EUROKKA kaj Vinilkosmo, kaj tiu de Viktoro Solé pri muzikaj efektoj. Oni dancis danke al la ateliero de Mon Cardona pri tradiciaj dancoj tutmondaj kaj al la koncerto de JoMo. Fine, substrekeblas la ekskurso al muzeo Dalí, verŝajne la plej konata kataluna artisto eksterlande. Resume, bela etoso en bela urbo por revidi amikojn kaj ekkoni novajn.

Ĉi tiu artikolo aperis en la novembra-decembra kajero de *La Ondo de Esperanto* (2016).

.....  
La Balta Ondo

### NOVA EKSPOZICIO PRI MIQUEL PEDROLA, KONTRAŬFAŜISMA ESPERANTISTO EL LA BARCELONETA

La 15-an de novembro okazis la inaŭguro de la l'ekspozicio pri Miquel Pedrola en la "Casa de la Barceloneta 1761". Pedrola estis kontraŭfaŝisma miliciano el la Barcelona havena kvartalo Barceloneta, kiu mortis en la komenco de la hispana enlanda milito en la Aragona batalfronto. Liaj kunuloj dediĉis straton je lia memoro, kies aktuala nomo estas Sant Miquel. En la jaro 2008, la historiisto kaj KEA-ano Dani Cortijo malkovris neatenditan skribaĵon sur stratmuro kaj ek esploris tiun historion.

La familio Pedrola sciigis pri tio pere de la televido kaj rivelis, ke Miquel Pedrola havis filinon, naskiĝintan post lia morto. Unu jaro poste, Amada Pedrola (kiu loĝas en Limoĝo, Okcitanio) kaj Dani Cortijo vizitis kune



la lokon de la tiama batalfronto kie mortis ŝia patro. Laste oni malkovris, ke Miquel Pedrola estis konvinkita esperantisto, kiu eĉ instruis la lingvon al sia kunulino, la patrino de Amada.

KEA gratulas nian kunasocion pro lia esplora tasko kaj invitas ĉiujn interesitojn viziti tiun ekspozicion, dum kiu oni povos spekti la filmon realigitan de Yonay Boix pri la vizito al la batalfronto.

### ZAMENHOF-TAGO EN BARCELONO...

Kiel ĉiujare, la 15-an de decembro, KEA solenis la naskiĝon de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun gvidata vizito Esperante al la ekspozicio «Miquel Pedrola. De vestigo al memoro». Ĉiujare, la tago estis dediĉita al la figuro de Miquel Pedrola, kontraŭfaŝisma miliciano el Barceloneta (barcelona havena kvartalo), kiu mortis dum la unuaj tagoj de la Hispana Enlanda Milito en la Aragona batalfronto, kaj kiu krome estis esperantisto. La solenaĵo konsistis en vizito al la ekspozicio, gvidata de ĝia komisaro kaj nia samasocio, la historiisto Dani Cortijo, aŭtoro de la blogo Altres Barcelones.

### ... KAJ EN SABADELO

Kiel kutime, Centre Esperanto Sabadell organizis tagmanĝon por soleni la naskiĝon de Zamenhof. Ĉi-jare okazis dimanĉe la 18-an de decembro kun bunta partopreno.

# ESPERANTO\* CAT

\*Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio

---



L'Associació Catalana d'Esperanto aplega els esperantistes dels Països Catalans. Va ser fundada el 1980, com a continuadora de la Federació Esperantista Catalana d'abans de la guerra. És membre de la Federació d'Organitzacions Catalanes Internacionalment Reconegudes i la seva secció juvenil, la Joventut Catalana d'Esperanto, és membre de l'Organització Mundial de la Joventut Esperantista.

Les seves activitats bàsiques són donar a conèixer els problemes de desigualtat lingüística i l'esperanto a casa nostra, i facilitar l'aprenentatge i la pràctica de la llengua internacional. En aquest sentit ha editat un cert nombre de llibres i organitza regularment trobades, seminaris i congressos.

---

L'Associació Catalana d'Esperanto és el moviment social dels Països Catalans per a la democràcia lingüística.

- Treballem per què es garanteixin els drets lingüístics i la diversitat lingüística
- Treballem pel dret a a la comunicació plena entre persones de llengües diferents, com a mitjà de superació dels prejudicis vers la cultura de la pau
- Promovem l'ús del català als Països Catalans i difonem la cultura catalana arreu del món i el coneixement d'altres cultures per mitjà de l'esperanto.

**I per a tot això necessitem la teva col·laboració.**

**Fes-te'n soci**

---

**[www.esperanto.cat](http://www.esperanto.cat)**